



Universala Esperanto-Asocio
Por daŭripova
lingva kaj kultura diverseco



RIO+20
Konferenco de
Unuiĝintaj Nacioj
pri daŭripova
evoluo

Parolado de Brittany Trilford dum la malfermo de la Pintkunveno de UN, Rio+20

“Tēnā Koutou” el Novzelando.

Mi nomiĝas Brittany Trilford, mi estas 17 jaraĝa, nur infano. Hodiaŭ, en tiu ĉi momento, mi estas ĉiu infano, viaj infanoj, la tri bilionoj da infanoj en la mondo. Konsideru min, por ĉi tiuj kelkaj minutoj, kiel la duonon de la tutmonda loĝantaro.

Mi staras ĉi tie kun brulanta koro. Mi estas embarasita kaj kolera pro la stato de la mondo kaj mi volas ke ni kunlaboru nun por ŝanĝi tion. Ni estas ĉi tie por solvi problemojn kiujn ni kreis kune, por ke ni havu estontecon.

Vi kaj viaj registaroj promesis malpliigi malriĉecon kaj protekti la naturon. Vi jam promesis lukti kontraŭ la klimata ŝanĝiĝo, por certigo de pura akvo kaj sana manĝaĵo. Plurlandaj kompanioj jam promesis respekti la naturon, pli-ekologiigi sian produktadon, kompensi pro sia medio-malpurigo. Ĉio tio estis promesita, tamen nia estonto ankoraŭ estas en danĝero.

Ni ĉiuj konscias pri la paso de la tempo, kiu rapide elĉerpiĝas. Vi havas 72 horojn por decidi pri la sorto de viaj gefiloj, miaj gefiloj kaj pri tiuj de la miaj. Kaj mi startigas la horloĝon nun... tck tck tck.

Ni memoru pri tio, ke antaŭ 20 jaroj - en 1992, pli frue ol mi estis eĉ nur ideo en la kapo de miaj gepatroj - popoloj renkontiĝis ĉi tie en Rio por la unua Pintkunveno de la Tero. Ili sciis, ke ŝanĝo estas necesa. Ĉiuj niaj sistemoj estis misfunkciaj, disfalantaj ĉirkaŭ ni. Tiuj homoj kunvenis por agnoski ĉi tiujn defiojn, por labori por io pli bona, sindevontigi al io pli bona.

Ili faris grandajn promesojn kiuj ankoraŭ kreas en mi esperojn. Tiuj promesoj restis neplenumitaj, vakaj. Kiel tio povas okazi? Malgraŭ tio, ke ĉirkaŭ ni estas scioj ofertantaj solvojn. La naturo, kiel fasonilo, liveras al ni informojn pri tutaj sistemoj kompletaj, kie ĝermas la vivo, kreiĝas valoro, ebligas progreso, transformiĝoj, ŝanĝiĝoj.

Ni, la sekva generacio, postulas ŝanĝon. Ni postulas agojn, por ke ni havu estontecon kiu estos garantiita. Ni fidus vin ke en la venontaj 72 horoj vi metos niajn interesojn super ĉiujn aliajn kaj kuraĝos agi ĝuste. Gvidu nin. Ni volas gvidantojn, kiuj gvidas.

Mi estas ĉi tie por lukti por mia estonteco. Jen kial mi estas ĉi tie. Mi ŝatus fini per peto al vi: pripensu kial vi estas ĉi tie kaj kion vi povas fari. Ĉu vi estas ĉi tie por senkulpiĝi? Aŭ, vi estas ĉi tie por savi nin?

Video:

<http://www.linguistic-rights.org/rio/Rio+20.html#brittany>